

Wilhelm Busch,

Adele

tradukita de Karl Vanselow

bildrakontoj - aventuroj de fraŭlo

...

Tuj unue kun rapido
 Pro deziro al revido
 Serĉas Knopp vizitacele
 La loĝejon de Adele,
 Arda-kore, juna-aĝe
 Ege ŝi adoras lin.
 Ne plu vidis unu la alian.
 Pri la vana amo sen mezuro
 Ofte vekis penson elegian
 Ŝia dolĉa bildo sur la muro.
 Do demandi volas ŝin Tobias,
 Ĉu ŝi jam alie opinias.
 Nun ŝvitante, iom timiĝinte,
 Kun frapanta koro alveninte
 Ŝian pardon frapas li.
 “Kia ega ĝojo!” vokas ŝi.
 (Malpliigis lis ŝvito.)
 “Venu, venu, elektito
 De sopira mia koro!
 Daŭre kun revid-espero
 Mi vin tenis en memoro.
 Prenu lokon do sur la berĵero!
 Jes, anĝelo mia, kedu ĝin,
 Ne direble mi amegas vin.”
 Knopp anstataŭ amo-apetiton
 Pente sentas novan frunto-ŝviton.
 Jen, dum timsekundoj tiuj ĉi
 En la ĉambro saltas hundoj tri.
 “Helpu min!” kriegas la fraŭlin’,
 “Karegulo mia, savu min!”
 Ne atentinte la teruran vokon,
 Ne atendinte ŝian pluan diron
 Tobias forlasinte jam la lokon
 Daŭrigas la edzin-serĉadan iron.
 Malhelpis tiun ŝanĝon de l’ afero
 Eĉ ne la sida loko sur “berĵero”.

*Traduko de la Germana poemo “Eine alte Flamme” de WILHELM BUSCH (*1832-04-15 – †1908-01-09) en Esperanton de KARL VANSELOW (*1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-1054-2139 (2014-06-19 20:01:33)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto “Nia Lingvo Esperanto”, eldonita de Karl Vanselow. Pri tiu vidu la retejojn http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow, ankaŭ: <http://vanselow.wikispaces.com/>.